

Tagiĝo 16-17

*Neregula cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.
Eldonas Dům osvěty, zájmový kroužek Esperanto, Opava – 1954/III-IV,
adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 18, Opava*

Ni amu malhelpojn kaj obstine iru por atingi la noblan celon.

Ĉiuj homagoj komencas per klopodo direktata al difinita celo, aŭ jam efektivas celon je kiu ni sopiras. Estas fakto, ke ĉiuj libervolaj agoj de homoj devenas el sopiro de volo por la bono kaj por la certa celo. Kaj la fino de la homlaboro estas denove atingo de bono kaj la celo al kiu la volo estis tirita. Kian celon homo por sia animleviĝo elektas tio dependas de tio, kiel granda estas via socia sento. La valoron havas ĉiam tio, kio prosperas rekte aŭ nerekte al la socio, en kiu ni vivas kaj kreas.

Estas vero ke oni ĉiam ne scias iri al la celo kiu estis foje elektita tute certe kaj kuraĝe, eĉ se ĝi estus celo plej bona kaj plej bela. Ofte ni baraktas sur iaj baroj kiuj neantaŭvide starigas al ni en nian vojon, kaj kiuj fariĝas la bremsado de nia laboro. Iu verkisto skribis unuavide paradoksan konsilon: ke ĉiu devas ami ankaŭ la malhelpojn de siaj agoj. Tio ŝajnas al multaj nekomprenebla kaj kontraŭsena. Sed se ni pripensas tiun ĉi aferon pli bone, aperos al ni pli granda saĝeco. Nur la homo sopiranta la rapidajn sukcesojn kaj rekompencojn ne povas vidi la edukatan sencon kaj ĉiuj malhelpoj kaj vidas en ili nur sian malamikon, kiu ŝtelas al li la tempon, multebligas lian klopodon kaj neniigas lian laboron. Li ne vidas, ke la malhelpoj povas konduki lin al la brilaj venkoj.

Facile akirita sukceso de nia agado enhavas la danĝeron de fatala seniluziigo. Ankaŭ estas certe, ke facila sukceso ne estas ĉiam rezulto de nia celscia laboro, sed ofte la rezulto de simplaj hazardoj, kiuj ĉi tie feliĉe renkontiĝis. Malhelpoj kaj malsukcesoj edukas nin ke ni fariĝu pli severaj realistoj kaj ke ni kalkulu kun faktoj kiujn ni antaŭe ne vidis, kaj taksis malpli valoraj. Ili konvinkas nin pri tio kiel nesufiĉe ni estis armitaj por niaj taskoj. La malsukcesoj estas lernejo en kiu ni ekkonis nin kaj la vivon. Ami la malhelpojn signifas malfermi la animon al la potencoj, kiuj nin sekrete pelas antaŭen. Malhelpoj firmigas nian penson, altigas nian bravecon kaj gvidas nin al perfekteco kaj poste ili estas fonto de la vera ĝojo. Ili ekzercas nin en pacienco, nutras la nekontentecon kun ni mem, kaj koncentrigas kaj plifirmigas ĉiujn potencojn de nia volo. Per la venkoj de malhelpoj kaj de klopodoj la homo kreskas kaj formetas el sia vivo la hazardon.

Kaj ĉio, kion ni entreprenas estas sub la konstanta kontrolo de memkritiko kaj tiel donas al ni eblecon ekkoni kio bono aŭ mailbono, kio estas utila aŭ male. Nia volo fariĝas ĉiudirekte plifirma, pli konscienca, ĉar estas al ni eble trarigardi ĝisfunde niajn malfortajn flankojn kaj aktivigi en ni kaŝitajn povojn, kiuj ankoraŭ restadis nevekigitaj kaj neekzercitaj.

Ĉefe ni esperantistoj devas memori ĉiujn vortojn supre cititajn, ĉar en ĉiu roka samideano devas elkreski el la malhelpoj, el ĉia ĝisnuna kontraŭstaro kaj miopeco de multaj el nia esperanta movado firma radiko en firma fundamento, el kiu baldaŭ kreskos bela, gracia kaj fruktodona arbo. Ni edukitaj el malhelpoj povas travivi ĉiun persekuton eĉ tutan epokon de teroro kontraŭ ni kaj tamen niaj firmaj radikoj, kiuj konas la certan belan celon denove kreskos al sia suno kaj denove eĉ kun ankoraŭ pli granda potenco disvastigos nian movadon kaj fine venkos. Nia movado vivis, vivas kaj neniam mortos. Baldaŭ ni fiestos nian gloran venkon. Ne perdu esperon kaj kun amo, kun pensoj je nia celo konstante laboru. Restu fidelaj al nia movado ĝismorte.

JaK

Ani snídaně ani svačina nestačí naplnit věčně prázdné vnitřnosti táborníků, a proto je nutno dodat scházející obědem, který je velmi vydatný a není pamětníka, že by se bylo něco pokazilo.

Odpolední koupání umožňuje překonat hravě část dne a osvěží všechny k odpolednímu zaměstnání. Svačina i večere vak přicházejí opět do téměř prázdných žaludků. Sem by měli přijít docenti fyziologie studovat pochody v zařívacím ústrojí a jistě by museli opravit některé své názory, které platí jen v městě a ne v lese.

Po celou dobu tábora není nouze o veselé příhody, které známý esperantský filmový režisér PESO zachytí na černobílý nebo barevný film, který i po letech ukáže vše krásné, co tábor prožil.

Blíží se však konec tábora a tak rychle jak vyrostl opět mizí a v několika hodinách se v lesích v údolí Moravice rozhostí božský klid, který tam vládne až do příchodu nového turnusu.

Zveme proto všechny mladé, nebo kteří se mladými cítí, aby s námi strávili jeden ze tří turnusů esp. tábora, které budou od 5.7. - 15.8. 54 vždy po 14 dnech. Kursovné bude činit asi Kčs 200,-. Abychom zdolali veškeré práce, které se nám těsně před táborem nahnou, prosíme, abyste se přihlásili co možná nejdříve. 1. srpna bude na zámku v Hradci celostátní schůze mládeže. Ostatní podrobnosti můžete se dočíst v minulém 15. čísle "TAGIĜA".

Těšíme se na shledanou.

Opavské junularo.

TUTŜTATA KONKURSO DE JUNULARAJ GRUPOJ

=====

Skupina	docházka			kursy		klasifikace	hlášení			plán	premiové body			celkem za čtvrt letí	celkem do dneška	pořadí skupin
	12	1	2	1	2		12	1	2		12	1	2			
Brno	30	26	26	-	-	185	5	5	5	10	35	-	130	454	454	1
Třebíč	20	20	26	-	-	145	5	5	5	10	40	-	25	301	301	4
Kroměříž	-	24	-	-	-	50	-	5	-	10	-	-	-	89	89	8
Opava	18	22	22	-	-	140	5	1	5	10	53	59	76	411	411	2
Ostrava	28	14	26	-	-	210	-	1	5	6	35	-	-	325	325	3
Chrudim	22	20	20	22	-	25	5	5	5	10	-	-	-	134	134	7
Lanškroun	26	8	23	-	-	60	5	5	5	10	50	6	-	198	198	5
Pardubice	22	19	22	-	-	70	5	5	5	10	-	10	25	193	193	6

Do soutěže esp. mládeže v naší vlasti přihlásilo se celkem 8 skupin. Není jich mnoho, hodně ostatních stojí mimo soutěž. Nechtějí se vázat na trochu zodpovědnosti vůči kolektivu. Proto budiž čest našim soutěžícím skupinám.

Prvního místa dosáhla skup. reg.per. J.Wenera – Brno a vede s menším náskokem se 454 body před opavskou skupinou, která obsadila místo druhé a dosáhla 411 bodů. Třetí místo obsadila skupina Ostrava se 325 b. Na čtvrtém místě se umístilo Junularo Třebíč se 301 b., na 5.,6.,7.místě jsou téměř s nepatrnými rozdíly skupiny: Lanškroun 198, Pardubice 193, Chrudim 134 body.

Dle krajů jsou tyto výsledky: Kraj Brno 844 b., kraj Ostrava 736 b., kraj Pardubice 525 bodů.

Dle přehledu bodů v tabulce vidíme, že nejlepší docházku má junularo Brno s 84 body, dále Ostrava 68 b., Třebíč 66 p., Pardubice 63 b.

V prem. bodech vede Opava s 188 b, dále brno s 165 b, Třebíč 65 b.

Kursy doposud ukončil pouze Chrudim, který obdržel 22b. Ostatní skupiny teprve kursy ukončí v nejkratší době.

Co se týče počtu členstva /soutěžícího/ je na 1. místě Ostrava 210 b, 2. místo opět Brno 185 b, 3 místo Třebíč 145 b a 4 místo Opava 140 b.

Myslím, že těmito statistickými údaji dostali jsme dosti dobrý přehled o soutěžících skupinách a můžeme si udělati úsudek o jejich práci. Pro skupiny dosažené výsledky budiž

pobídkou k zdravé soutěži o získání co nejlepšího umístění a pobídkou do ještě houževnatější práce. Pro skupiny v kraji pražském, budiž to konečně zahanbením, že dedovedly mít tolik odvahy se do soutěže přihlásit a tak nám jasně dokázat co dovedou.

Není třeba více slov a proto volám - zaktivisovat všechny síly a vzhůru do další práce.

Via CENTREJO

000000000

Programový kalendař /rozvrh esp. podniků/:

Aby se nekonaly esp. podniky, jako na příklad výstavky, večírky, sjezdy a pod., v týž den v několika místech souasně, bylo navrženo a schváleno na sjezdu Junulara v Ostravě /15.3-1955/, aby dotyční, kteří tyto podniky plánují, oznámili tyto předem na adresu: Svačina Fran., Esperanto, Lanžhot, okr. Břeclav, který odepíše dotyčnému plánovateli, plánování samideánů.

Organizaj aferoj - daŭrigo.

Schválení prem. bodů za dobu od 1. 12.55 - 23.2.1954.

<u>Brno:</u>	Za aktivní účast pri E-seminári v Lanškrouně /recitace/	20 b
	uspořádání vánočního a mikul. večírku s programem	15 b
	přednášky v Esp.: Atombombo, Civilizo antaŭ 6,000 jaroj	
	pri devenoj de lingvoj, Origino de la vivo po 15 b	60 b
	překlad písní: Tintilo /Rolničky/ 4b, Ranoj ĉe lago 6b	10 b
	teatraĵo: Libertempo en Italio	20 b
	za. ĉinnost reg. peranto kraj Brno – Jana Wenera	40 b
<u>Třebíč:</u>	Oběžník Frateco	15 b
	Mikulášská a vánoční besídka	15 b
	za spolupráci s rodiči dětí činných v Esp.	10 b
	za vzornou kolekt. ĉinnost – výlety, navštěvy, hry...	25 b
<u>Opava:</u>	22 stran Tagiĝa 12/53, 1,2/54 po 3b	66 b
	Zamenhofův večer s kulturním progr. pro rod. ĉlonů, kursantů	
	a pro známé	30 b
	/Mikulášský, Silvestr a kulturní večer mimo schůzku	30 b
	Sylabus otázok - rozmnožení 5 str po 1 bodu	5 b
	překlad, služba mezi jap. dětmi a pionýry - 9 dopisů á 3b	27 b
	Český orig. básně: Zvedněte prapor naděje	15 b
	za ĉinnost reg. peranta kraj Ostrava - Magda Matušková	15 b
<u>Ostrava:</u>	Zamenhofův večer s kult. progr. pro známé	25 b
	Mikulášský večer	10 b
<u>Lanškroun:</u>	Esp. seminář	50 b
	2 str. Esp. Vorto	6 b
<u>Pardubice:</u>	večírek na zahájení v nové klubovně	10 b
	za ĉinnost reg. peranto kraj Pardubice - Karel Franc	25 b

Ohodnocení práce jednotlivých reg. perantoj:

Nejaktivnějším ve své funkci byl s-ano Werner Jan za krajo Brno - Gottwaldov- Jihlava, který vydal za tuto dobu celkem 5 kra j. oběžníků, a byl vlastně iniciátorem a vzorem pro ĉinnost všech ostatních reg. per. Dovedl nejlépe zaktivizovat skupiny ve svém kraji, dával jim konkrétní připomínky a návrhy a dodával jim stále nadšení v jejich práci. Podal mnoho návrhů na organizaci soutěže esp. mládeže a dovedl i ze svého hlediska kritisovat práci Centreja a podal návrhy jak odstranit dosavadní závady. Za jeho aktivní ĉinnost uděluji skupině ke ktere patří / dle předešlých ujednání/ 40 premiových bodů.

Rovněž reg. per. za kraj Olomouc-Ostrava M. Matušková, vykonávala svou funkci čestně, vydala za uplynulou dobu 4 kraj. oběžníky, byla v úzkém styku se svými skupinami, bohužel však nedokázala zaktivizovat a přimět skupiny Olomouc a Přerov do soutěže. Při větší iniciativě by snad se dosáhlo více. Hodnotím její práci 15 body.

Reg. per. pro kraj Liberec, Hradec Králové, Pardubice, s-ano Karel Franc, se rovněž snažil udělati co bylo v jeho silách. Podařilo se mu udržet a oživit práci svých skupin a všechny se přihlásily do soutěže. Svoji iniciativu prokázal i užší spoluprací s Centrejem. Podával hlášení včas a zřejmě dokázal být v úzkém styku se svými skupinami. Hodnotím jeho práci 25 body.

Reg. peranto pro kraj Praha nevykonával svou funkci. Neobdržel jsem od něho žádná hlášení, pražská skupina i když dle jiných pramenů pracuje a je aktivní, přesto se k soutěži nepřihlásila. Je zde vidět velmi malá iniciativa s-ana Pastora /reg. per./, který nedovedl přimět tuto skupinu ke vstupu do soutěže. Rovněž tak nemám žádných zpráv o okolních skupinách, které i když v soutěži nejsou, přece projevují známky života a jistě mnohé z nich jsou aktivní.

Nemohu tedy zcela ohodnotit jeho práci. A připomínám zmíněným skupinám v pražském kraji, aby oni z vlastní iniciativy se postaraly o to, aby se zařadily mezi ostatní soutěžící skupiny naší republiky, a aby samy svou stálou intervencí nutily své ved. skupin, aby hlášení krajskému delegátu zasílali, a ved. skupin, aby opět trvali na tom, aby reg. per. zprávy dodával Centreju. Organisační práci v pražském kraji nutno bezodkladně zlepšit!!!!

Co se týká kraje Č. Budějovice a Jižních Čech, kde byl zvolen jako reg. peranto s-ano Vlk, již jsem oznámil v min. čísle Tagiĝo, že tento odešel na voj. pres. službu a proto nebylo o J.Čechách slyšet žádných zpráv. Jediná hlášení která jsem obdržel, byly od skupiny Písek. Rovněž tam byl v měs. únoru pověřen funkcí kraj. důvěrník s-ano Křivánek, který přislíbil plnou spolupráci v naší mládežnické organizaci. Bude mít těžkou práci, avšak při dobré vůli i tento úkol rozřeší.

Podávám rovněž stručné hlášení o činnosti ve své funkci předsedy esp. mládeže ČŠR a žádám, aby členové Centreja jakož 1 krajští delegáti obodovali tuto činnost a posoudili vykonanou práci a eventuelní prem. body budou připsány opavské skupině.

Jako orgán ep. mládeže vydával jsem Oběžník Tagiĝo. Vyšlo celkem od počátku mé působnosti t. j. od listopadu min. roku včetně tohoto čísla, 6 výtisků (12 – 17). Snažil jsem se, aby tento oběžník dál všem jako orgonisační pokyny, tak i materiál ku čtení a procvičování se ve skupinách v Esperantu.

Udržoval jsem nutný písemný styk s krajskými delegáty a s jinými skupiny mi. Řešil jsem otázku krajského delegáta v Již. Čechách. Vyřídil jsem mnoho jiné korespondence týkající se našeho hnutí. Pro časové potíže nedovedl jsem zvládnout veškeré úkoly ke zdárnému rozvinutí esp. hnutí mládeže, rovněž nedokázal jsem zainteresovat esp. skupiny Slovenska ke spolupráci s českými s-ány. Doufám, že tato otázka se podaří řešit v příštím roku. Přiznávám se, že nestačím po stránce organisační plně rozvinout hnutí esp. mládeže v naší vlasti a jistě zde zbývá mnoho úkolů k rozřešení.

Úspěšná činnost našeho hnutí ovšem neleží jen v rukou jedného člověka, ale hlavně v rukou krajských delegátů, kteří zde mají plnou možnost rozvinout svou iniciativu k rozkvětu hnutí, kteří mají morální povinnost radit a pomáhat svým skupinám a nadchnout je k aktivní proesperantské práci. A že to jde, že máme schopné jedince mezi sebou, o tom svědčí nadšená plodná práce s-ana Wenera, který se skutečně o jemu svěřené skupiny stará.

Ohodnotit práci členů Centreja mi dosavad není možné, neboť nedostal jsem potřebná hlášení o jejich činnosti. Žádám proto příslušné členy, aby mi zaslali hlášení činnosti za dobu od počátku soutěže a dodatečně budou obodováni a body připsány té skupině, kde svým členstvím náleží.

Kuzník Jaroslav

INVITILO

Esperanta rondeto de uzina klubo "Přerovské strojírny" invitas vin je la tutŝtata konferenco k. Interkonatiga vespereto de Esperantistaj rondetoj, kiu okazos la 22-an k. 23-an de majo 1954. en Granda salono de Přerova Bierfabrikejo nacia entrepreno en Přerov.

Programo: Sabato la 22-an de majo 1954. - je la 20-a horo festa malfermo de interkonatiĝa vespereto per polonezo. Dum ĉiuj interdancaj paŭzoj kulturaj enmetaĵoj.

Dimanĉo: la 23-an de majo 1954. je la 8-a horo laborkonferenco sub devizo: Efika propagando por Esperanto k. laboro por tutmonda paco!

Venu el tuta respubliko multnombre!!

Rakonto pri la punca stelo.

Tanko forveturadis antaŭen kaj elĵetadis el sub siaj lamenoj arkojn de ŝutiga, frostiĝinta neĝo. Direkto de ĝia vojo estis al okcidento. Ŝajnis, ke la maŝino veturas sola kontraŭ mortigintoj, ke elĝi fariĝis viva armilo, kiu sub la signo de punca stelo sur la turo veturigas venĝon kontraŭ faŝistoj.

Sokolov kondukis sian tankon en ofensivon. La unua sturmo estis terurega. Resonis pafegoj, armiloj, eĉ korpoj de Hitlersoldatoj elflugadis en alton. Sokolov kun plena gaso iris renove en atakon. Malantaŭ de vilaĝo etendiĝis granda kampo, brilanta fare de blanka neĝo. Subite el lazura ĉielo falis al tiu ĉi kampo kun siblanta vento je la flugiloj arĝenta aeroplano. Sur la trunko eĉ sur la flugilo de l' maŝino brulis puncaj steletoj.

Sokolov haltigis la tankon kaj kun doloro rigardis la aeroplanon kiel malfermitan vundon, sentante sian neeblecon kaj senpovatecon helpi alĝi. La aeroplano ne detruigis; surteriĝis per radoj en neĝon kaj haltigis. Tio estis efektive majstra alteriĝo. El kajuto eksaltis piloto kaj kuregis al motoro.

En la sama momento eksaltis el vilaĝo hitleruloj kaj ŝovrampante proksimiĝis ili al aeroplano. Post momento iliaj kugloj atingos la piloton. Ne estis tempo por pripenso. Sokolov ekpemis gason, funkciigis rapidoecon kaj maŝino ekmoviĝis. Tanko veturis en arko, en kiu meze staris malgranda arĝenta spiona aeroplano kun puncaj steletoj sur surfaco de flugiloj.

Tio estis peniga batalo! Tanko rondveturadis ĉirkaŭ aeroplano simila al aglo, kiu ŝirmas sian idon. Pafaĵoj ĝin frapegis kaj surde sonoris kiraso sub rompaĵoj de pafaĵoj, sed Sokolov ne cedis.

Neniu hitlerulo sukcesis trairi la rondon, eveturigitan en neĝo per lamenoj de tanko. Fine lielpafis lastan ŝarĝaĵon. Sokolo rerigardis – aeroplano jam sur kampo ne estis. Estis videblaj nur radokavoj, kiuj perdiĝis en neĝa pulvo, kirligita fare de helico de aeroplano. Sokolov ekrigardis tra periskopo, por ke li ekvidu piloton, sed en tiu ĉi momento pafaĵo trafis gasogenon de tanko. Ŝtalo eltenis ekfrapegon de eksplodo, sed ĝiaj rompaĵoj kojnumis en gasogeno kaj tanko restis senmova sur neŝirmita plataĵo, malproksimita de propraj postenoj.

Sokolov eksaltis el tanko, sed multnombraj kugloj de hitleruloj devigis lin ekuŝi sur tero. De vilaĝo proksimiĝis singardeme germanaj soldatoj. Subite li ekaŭdis super si bruon de motoro kaj ombro de flugiloj transflugis tankon. En la regiono ekresonis krakado de maŝinpafiloj kaj hitleruloj estis devigitaj ĵeti sin en neĝon. Super la kampo ŝvebis aeroplano ĉirkaŭ de difektita tanko. Sokolov ekstaris. Kelkaj minutoj sufiĉis por ke tanko estu renove ekfunkciigita kaj ĝia ŝtala koro ekvivis. Kaj kiam tanko liberigis sin el ĉirkaŭgeso la aeroplano ekflugis supren, ĝojante el sukceso de sia kamarado.

Pasis tagoj. En malgranda ĉambreto kuniris foje tankisto kun piloto. Ili ambaŭ estis emociitaj kaj silentis. Ili ne konis sin reciproke kaj ne parolis pri siaj okazoj. Blondhara oficiro alkroĉis sur iliajn armeajn bluzojn puncajn steletojn.

Ĵ a k e l i n o (Jacquelina)

Estis sabato; la 26-an de Aŭgusto 1944, - la tago, kiu ekscitis la tutan mondon. La tago, kiun Parizo festis sian liberigon.

Unu Amerikano eniris malgrandan duonrompitan hotelon en distrikto de Monmartro. La hotelo estis forlasita, kvankam oni ankoroŭ pafis, la tuta Parizo estis sur la stratoj. Amerikano iris ĝis tria etaĝo, trairis la maltan koridoron kaj delikate frapis la pordon de subtegmenta ĉambreto. Nenia respondo. Li frapis denove. Poste laca knabina voĉo diris: "Eniru!"

Antaŭ la milito, kapitano Petro Marten estis arĥitekto. Li aspektis kiel franco kaj ankaŭ li parolis tiun lingvon kiel naskita franco.

En printempo 1945, kapitano Marten aliĝis por speciala tasko en Francujo. Li absolvis trimonaton kurson. Li lernis parkere sian elpensitan biografton. Kuracisto tre zorgeme instruis lin, kiel simuli la simptomojn de la malsano, kiu faros lin nekapabla servi en franca armeo. Li ricevis francan vestaĵon, francan monon, falsajn dokumentojn kaj fine li estis transportita el franca bordo en submarŝipo.

Unu nokton en januaro 1944 kapitano Marten atendis tre gravan informon el Parizo, kiun li devis transdoni al Londono. La kuriero estis knabino - blondhara, bluokula. Ŝi havis nur 21 jarojn kaj ŝia nomo estis Ĵakelino. Vere ŝi ne aspektis kiel kuriero de subtera movado, kapabla transportadi la plej gravajn informojn tra longaj kilometroj de teritorio, plena de Gestapo. Kaj tamen ĝi estis vero!

Lia unua impresio estis, ke ŝi estas tro bela kaj singena. Pro ia argumento li deziris, ke ŝi forlasu tiun ŝi danĝeran laboron. Ŝi ŝajnis esti tiom delikata! Ili parolis france. Sed ŝi sciis, kio li estas. Ŝi diris al li, ke ŝi ĉiam deziris vidi Novjorkon kaj aŭdi Benny Goodman. Li promesis veturi kun ŝi al Novjorko post la milito. Li admiris ŝian patriotismon kaj heroecon. Li respektis ŝian malamon al okupintoj kaj francaj periduloj. La finomon "Boŝ" ŝi elparolis ĉiam kun speciala, intensa sono.

Kiel multaj knabinoj en Eŭropo tiutempe, ankaŭ ŝi portis ĉiam sekrete kaŝitan boteleton da veneno en siaj longaj, blandaj haroj. Ŝi nomis ĝin "Ĝojo de la vivo" /Joie do vivre/. Se kaptita, ŝi uzis ĝin, ke ili ne povu ŝin torturi. "Torturo", ŝi diris al kapitano, "aĥ, tio ne estus tolerebla!" -- Lasta renkontiĝo de Ĵakelino kun kapitano okazis nur dek tagoj antaŭ la liberigo de Parizo. Sed kiam ŝi volis reveni al Parizo, haltigis ŝin inspektoro de Vichy sekreta polico, "Se vi estas franco kaj ne malpura Boŝ, vi lasos min iri" - diris ŝi al inspektoro. Li venigis ŝin en lokan arestejon, kie ŝi devis atendi la esploradon.

Ĵakelino perdis tiam la kapon. Ŝi provis manĝi sian venenon. Sed la policano kaptis ŝian manon. Ŝi ricevis tuj la kuracilon. Ili volis havi Ĵakelinon vivanta! Venontan alveturis al arestejo konata Georgo Mathio, akompanata kun plena ŝarĝaŭtomobilo de Vichy milicistoj kaj Gestapo-oficiroj. Mathio estis la plej malamata kaj malŝatata renegato en Francujo. En novembro 1944, kiam post liberigo li staris antaŭ la franca juĝo, Georgo Mathio nur ridetis, kiam la prokuroro legis teruran ateston pri la fakto, ke li persone brulvundigis la mamojn de 14 virinoj per ruĝe ardigitaj feraĵoj. - "Kiam iu persono aperos en mia listo, la afero progresas aŭtomate. Ĉiu homo diros ol mi ĉion, kion li scias", - diris tiom Georgo Mathio. Ĵakelino estis en lia listo.

Unu posttagmezon, kiam polico arestis multon da homoj, estis arestita ankaŭ kapitano Marten. Liaj dokumentoj kaj biografio estis en ordo, sed ili prenis lin en arestejon kun ĉiuj aliaj. En la arestejo li ekkonis, ke Ĵakelino estas kaptita.

"Torturo, aĥ, tio ne estus tolerebla!" kapitano Marten rememoris tojn de Ĵakelino. Li konis la metodojn de Gestapo, kapablaj fari el heroa homo kiantan mason da nervoj kaj sanganta karno. Li pensis pri Ĵakelino, tiel bela, tiel delikata. Lia ĉelo estis ĵus sub lia tria etaĝo, kie Georgo Mathio "esploris" Ĵakelinon. Li aŭdis ŝian voĉon: "Mi ne scias! Mi ne scias!" Kaj poste: "Aĥ ne, ne - ne!" Kaj poste kriaĉon de Ĵakelino, ne homan, animon disŝiritan, teruran, nepriskribeblan kriaĉon. Kapitano Marten sidis kaj aŭdis, malesperanta, ne povante helpi. En tiu momento li ricevis la ideon diri, kiu li estas kaj tiel savi ŝin. Vere, li amas ŝin. - Fine la sonoj malaŭdiĝis.

Venontan tagon policistoj venigis kapitanon al la inspektoro. Liaj dokumentoj kaj historieto estis konvikaj kaj li fariĝis libera. Ĵakelino estis transportita en aŭtomobilo de Gestapo al Parizo. Li pensis, ke ŝi ne vivas plu.

Usonaj tankoj ruliĝis tra Francujo, kiam kapitano Marten ricevis el Parizo leteron de unu franco, kamarado, kiu estis arestita kun Ĵakelino kaj sukcesis fuĝi. La letero rilatis al Ĵakelino. Unu alineo sonis: "Bestio Mathio torturis malfeliĉan Ĵakelinon. La heroo knabino diris nenion, eĉ ne sian nomon. Fine ili lasis ŝin libere foriri - eble por spioni ŝin. Unu apotekisto kudris ŝiajn vundojn sur la vizaĝo, sed bedaŭrinde ne tre lerte. Ŝia aspekto estas tre malgaja, sed ŝi resaniĝos. Tuta Francujo estas tia!"

Nekredeble rapida marŝo de usonaj tankoj de mara bordo al Parizo ŝajnis esti eterna al kapitano Marten. Li atingis Parizon matene la 25-an de aŭgusto 1944 kun antaŭaj partoj de kirasita divizio de generalo Leclerk. Amikoj el subtera movado diris al li, kie estas Ĵakelino. Kaj nun li trovis ŝin en tiu hotela ĉambreto de Monmartro, dume la ĝojkriantaj popolamasoj solenis sian liberiĝon!

Ili sidis kune en mallumiĝinta ĉambro, parolis pri si kaj kapitano Marten ankaŭ pri siaj sentoj. La kravalo de masoj ekstere sonis kiel malproksima muĝanta maro. - Ĵakelino klopodis ne aŭdi lin. Ŝi akuzis lin de "amerika sentimentalismo". Ŝi ne volis esti bedaŭrata, eĉ ne de li!

Sed en vintro estis Ĵakelino sukcesplene operaciita en Londono. Baldaŭ ŝi estos en Ameriko. Ŝi ekvidos Novjorkon kaj aŭdos Benny Goodman.

Antaŭ ses monatoj ŝi kaj kapitano, nun majoro Marten, geedziĝis en Anglujo.

/Gazeto CORONET,
Oktobro 1946/

"LA LABORISTA ESPERANTISTO"

tiun ĉi gazeton abonu ĉe:

s-ano Slaný Vlad., Kutuzova 29, Ostrava-Vítkovice,
kiu estas ĝia peranto por Ĉeĥoslovakio

Jarabono 8 Kčs kun poŝtelspezoj

Somera Esperanta kursaro de Theodoro Ĉejka en Příbor okazos de la 18-a - 31-a de julio 1954. La informojn oni povus postuli de s-anoj Ant. Sattek, Dvořákova 744, příbor – aŭ ĉe Vlad. Slaný, Kutuzovova 29, Ostrava-Vítkovice.

Daŭrigo de travivaĵoj de ŝipana vojaĝanto-esperantisto.

Mi salutas vin el granda havena urbo Ŝteto, kie mi nuntempe troviĝas kun vaporŝipo Ostrava.

La urbo Ŝteto estis tre difektita fare de milita bombardado. Multaj domoj, pontoj kaj havenaj objektoj estis detruitaj kaj ĝis nuna tempo multo ne estis riparita. Mankas loĝejoj. Ne estas rara vidi, kiel en la ruinoj, riparitaj nur tiom por ke ili ne falu, loĝas familioj, kiuj ne povis prizorgi por si lan pli bonan loĝejon.

Kuracistoj kaj metiistoj povas ĉi tie praktiki sian fakon private, tial troviĝas du grupoj en ĉiuj fakoj. La ŝtata (kooperativa) kaj la privata. Tio kaŭzas, ke ekzistas ankaŭ diversaj prezoj de varoj.

Multaj homoj vivas ĉi tiu el ŝtelado kaj spekulado. Mia kolego, kiam ni alvenis deĵorejon por prezenti nin, pruntedonis al ia viro sian plumon, momente interbabilis kun sia kamarado kaj kiam li poste returnis sin, li ekvidis, ke la viro furkuris eĉ kun lia plumo kaj jam ne plu estis videbla.

Sed post kelkaj tagoj li denove trovis ĝin ĉe unu ŝipano, sed tiu homo asertis, ke li aĉetis la plumon de unu viro, kiu rapide bezonis forvojaĝi kaj havis malmulte da mono por aĉeti veturbileton.

En stratoj de havena urbo vi povis vendi kaj aĉeti ĉion. De jako kaj ĉemizo, ĝis fotoaparato kaj horloĝo. Kiam oni iras surstrate, ne estas rara, ke la preteriranto demandas vin, ĉu vi ne volas ion vendi, aŭ alia denove ĉu vi ne volas aĉeti ekzemple horloĝon. Sed ĉe la aĉetado de diversajoj de stratvendistoj oni devas esti singardemaj, ĉar estas facila veni en ĉagrenon. Mi memvidis, kiam en unu aĉa restoracio vendis ia junulo tre belajn gantojn al unu gasto kaj poste alkondukis policanon montrante al li la sinjoron, al kiu li vendis la gantojn, kaj diris, ke tiu ilin al liŝtelis. Vanaj estus la paroloj de la kompatinda persono, se ni ĉiuj ne atestus ke la junulo antaŭ nelonge vendis la gantojn antaŭ niaj okuloj al la sole sidanta gasto. Do okazis ke policano forkondukis la ruzan arogantulon kiu ne sukcesis per sia agado.

Oni devas esti ankaŭ singardemaj vespere. Al unu mia konatulo okzis, kiam li iris vespere surstrate, ke venis al li ia fraŭlino kaj invitis lin en sian loĝejon. Ĉar la junulo ne pripensis la situacion, li la inviton akceptis, sed jam ne revenis. Pli poste li estis trovita senkonscie kuŝanta en unu ruinigita domo. La fraŭlino alkondukis lin al periferio kaj tie kun siaj helpantoj la junulon senkonciigis kaj ŝtelis al li ĉion.

Mi, kien ajn mi alvenas, ekkomencas paroli unue Esperante kaj poste se ne estas komprenateal mi, mi kun mira demando, ĉu vi ne konas Esperanton, komencas paroli en nacilingvo. Do mi foje vizitis Ŝtetinan poŝoficejon kaj volis sendi leteron en ĈSR. Fraŭlino ĉe la giĉeto diris: "pardonu, mi konas angle, france, sed tiun lingvon mi ne konas." Do mi klarigis, ke tio estas internacia lingvo Esperanto kaj rekomendis al ŝi la lernadon.

Sek

oooooooooooo

Logiko. -- "Iu ajn certe gajnos la grandan loton, ĉu ne?" - "Jes." - "Ĉu vi ne estas iu ajn?" - "Jes, mi estas iu ajn." - "Do estas vi, kiu gajnos la grandan loton!"

-hahaha-

Karaj legantoj!

Unue sinceran saluton kiel kutime. Antaŭ kelkaj tagoj mi estis hejme, kie mi tralegis Tagiĝon, en kiu troviĝis miaj rakontoj. Per tio mi estis kuraĝigita, kaj mi sendas pluan kontribuaĵon.

Mi volas esti iamaniere utila al niaj samideanoj. Mi proponas: se iu bezonas ian gazeton aŭ libron, kiu aperis en Pollando, mi povus antaŭpagi ĝin, eventuale aranĝi ĝian sendadon. Oni pagos al mi en ĉs kronoj al mia hejma adreso: V. Sládeček, Havlíčkova 19 – Karviná I.

Sincere via Sládeček.

Estis ĝuste meze de februaro, kiam estis baptita en Gynia haveno dua ĉeĥoslovaka ŝipo Julius Fučík. - Vetero estis malvarma, frosta, kiu ne devis, ne eltiris eĉ la piedon el sia domo kaj varmigis sin hejme ĉe la fajro. Sed multaj homoj, kiuj devis esti eksterdome, varmigis sin diversmaniere. Mi vidis pasiajn fiŝkaptistojn, kiuj elhakis en la glacio truon kaj metinte en ĝin la fiŝhokon poste furioze saltadis kaj ekzercis sur la glacio por varmigi sin. Post la tempo, kiam ŝajnis, ke la fiŝo jam "prenas", ili eltiris siajn fiŝhokojn, denove ĵetis ilin en truon kaj regimnastikis.

Multaj maristoj varmigis sin per trinkado de la alkoholaĵoj. Estas konate, ke multaj polaj maristoj estas gastamaj. Tial okazis, ke la ĉeĥoslovakaj ŝipanoj, kiuj estas en Pollando irante urben prizorgi al si la manĝaĵon, kutime revenas malfrue, troviĝante en "edifa" bonhumoro. Revenante al siaj ŝipoj, ili tuj pente senkulpigis sin: renkontis ja nin polaj maristoj, kiuj havis devizon – nia maro, via maro – Kaj devigis nin iri gastejon por trinki glaseton ĉe okazo de la baptado de dua ĉeĥoslovaka transmara ŝipo. Ni en intereso de internacia amikeco de laboruloj ne povis rifuzi kaj en la gastejo post unu glaseto sekvis duaj kaj fine ĉiu portis ŝipen belan "simieton".

Al mi plaĉis unu kolego, kiu en urbo aĉetis dudekon da ovoĵoj kaj unu kilogramon da faruno por sia kuirejo kaj revenis hejmen ne nur piede, sed ankaŭ mane kaj verŝajne eĉ kape, ĉar ĝi estis tute malpura, sed en dekstra mano li firme tenis la retmansaketon kun dudeko da ovoĵoj kaj kilogramo da faruno, temp' al tempe iom batetis per ĝi en la maron kaj ankaŭ en si kriante: "Pola maro, nia maro!" Certe jam estas tute superflue skribi, ke post li restis blanke flava streko.

Tiutempe la ĉefaj ŝipanoj en Pollando ricevis novajn uniformojn kaj krom tio ricevis ankoraŭ telegramon el Ĉeĥoslovakio, de nia plej bona amiko, ke li jam ne intencas resti libera kaj eniros post kelkaj tagoj en edzan koljungilon. Tion mi de tiu maljuna fraŭlo, kia estis ĉi tiu homo, tute ne atendis. Post tralegado de tiu ĉi sciigo mi estis tiel surprizita, ke mi sidiĝis en farunpastro, kiu ŝvelis trankvile sur la benko ĉe la forno. Sed tio ne estis ĉefa. Ĉefa estis, ke mi ekkonsciiĝis, ke estas necese viziti patrujon kaj deturni al la amiko lian intencon, aŭ se ne estos jam la alia vojo, do gratuli al li okaze de lia geedziĝo kaj sprite ekkompati lin. Do ĉar mi estas "viro de ago", mi tuj aranĝis necesajn paŝojn. Mi aĉetis duonlitron de "fajra akvo", kvazaŭ lastan rimedon savi ĉi tiun kompatulon (komprenu koncernas mian bonan amikon en edzan koljungilon eniranta) kaj vespere mi jam sidis en vagonaro kaj malpacience atendis ĝian forveturon. Ĉar tiutempe rapidvagonaroj pro frostado ne veturadis, mi devis veturi per personvagonaro. Mi estis maltrankvila, sed post multhora veturado mi jam estis tiel lacigita, ke mi ekdormis, kaj tute ne sciis, kiam en unu stacio alvenis nova vojaĝanto kaj donis sian kofreton super mian kapon. Mi vekigis nur kiam mi sentis, ke io fluas de supre je mi. La kunvojaĝanto klarigis, ke li havis en sia kofreto botelon da vino kaj la korko el ĝi ekpafis. Al miaj protestoj li aldonis trankvile: "Okazis nenio. Via nova uniformo nun estas baptita per vino; nun ĝi povas nomi vera marista vesto." Ĉar mi troviĝis en fremdlando, kie mi reprezentas Ĉeĥoslovakio, mi nur kraĉis malrespekte teren, sed en nia lando mi opinias, ke ĉi tiu okazaĵo ne finus tiel trankvile. La haladzoj de vino efikis, ke mi denove eksonĝis kaj poste, kiam la vagonaro subite ekbremsis, mi estis ĵetita sur muron de la vagonaro kaj denove malfeliĉo okazis: la botelo kun fajra akvo, kiun mi zorgis en po krakis kaj la enhavon mi havis sur jako, surtuto kaj ĉemizo. Tra la fenestro mi elĵetis la romprestaĵojn, kaj post nelonge jam alvenis landlimo. La pasporta trarigardo finis, ankoraŭ kelkaj stacioj kaj mi troviĝis hejme. Elirante el la stacidomo, mi ŝanceliris, laca de 30 hora veturado, kaj per haladzoj de la vino kaj fajra akvo kvazaŭ ebria kaj mi eĉ ne ekvidis konatulon, kiu tuj apud la stacidomo bonvenigis min. Li sentis alkoholaĵojn de mi, sed konanta min kiel seriozan abstinenculon, li skuis la kapon kaj fine foriris. Sed irante preter nia domo li eniris kaj sciigis al mia panjo, ke mi troviĝas apud la stacidomo tute ebria. Mi post kelkminuta ŝancelirado influe de bona freŝa aero tute rekonsciigis kaj ankaŭ paŝis al la domo, rigardante ĉiujn novaĵojn en butikoj dumvoje.

Sed hejme mi trafis mian bonan panjon en plorado. Ŝi kredis la spritaĵon de la konatulo pri mia ebrio kaj jam eble meditis per kia parolado bonvenos min: - vi ĉiam estis obstina, sed nun vi faras skandalon ne nur al via familio, sed al tuta nacio, mi hontas anstataŭ vi. Sed subite mi hejmeniris kaj rompis ŝian malgajan cerbumadon per sincera manpremo kaj kise de revido. - Tiam mi reakiris la preskaŭ perditan famon de stranga ŝipano – abstinenculo kaj samideano.

Sek

Pre kurzy a somoukov doporučujeme
VEĽKÚ UČEBNICU ESPERANTA od J.V.Dolinského
128 strán – Ilustrácie – Ľudové piesne s notami.
Cena 12 Kčs /aj s poštovným/
Objednávky vybaví:
Ján Lamačka, Trenčín, Pod Sokolnicami 1675

Pohľadnice z TRENČÍNA a okolí
s esperantským textom,
dodá:
Ján Lamačka, Trenčín, Pod Sokolnicami 1675

ELLERNI 3 – 4

Sed tamen necesas studi la Fundamento?

"La FdE devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento, por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla. Ĝi devas esti por ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gvidos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco."

Ĉu ĝi prezentas ian baron kontraŭ la evoluo de Esperanto?

"Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la FdE, scias bone, ke ĝi ne sole ne prezentas baron kontraŭ la evoluo de la lingvo, sed male, ĝi donas al la evoluo grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo iam posedis. La sola celo, kiun la Fundamento havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ anarĥio, kontraŭ reformoj arbitraj kaj personaj."

Kelkaj esperantistoj opinias, ke vi uzas en viaj verkoj slavan stilon?

"Tiu opinio estas tute erara. Estas vero, ke la Slavoj ofte posedas en Esperanto pli bonan stilon ol la Germanoj aŭ Romanoj, sed tio ĉi ne venas de tio, ke la stilo de Esperanto estas slava, sed nur de tio, ke la slavaj lingvoj havas vortordon pli simplan kaj sekve ankaŭ pli proksiman al la vortordo en stilo en Esperanto. La vera Esperanta stilo estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas aŭ almenaŭ devas esti – nur stilo simpla kaj logika. Krome ĝi havas sian karakteron tute specialan kaj memstaran, kiu ellaboriĝis en la daŭro de longa uzado de la lingvo kaj ankaŭ en la pensado de tiu ĉi lingvo, antaŭ ol ĝi estis publikigita."

Kion vi opinias plej grava por nia laboro?

"Per unueco ni pli aŭ malpli frue venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigos nian aferon pli rapide ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni povas uzi per siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo."

Ĉu Esperanto estas tute perfekta?

"La esperantistoj tute ne pretendas, ke ilia lingvo prezentas ion tiom perfektan, ke nenio pli alta jam povas ekzisti. Sekve - se ni eĉ supozas, ke fina lingvo de estontaj generacioj estos ne Esperanto, sed ia alia, ankoraŭ ellaborota lingvo, en ĉia okazo la vojo al tiu lingvo nepre devas konduki tra Esperanto."

Ĉu la reformoj en Esperanto estas necesaj?

"Neniam mi intencis arbitre reformi Esperanton, ĉar tiu ne sole estas pereiga por nia afero, sed mi havas por tio ĉi nenian moralan rajton. Mi opinias, ke paroli pri reformoj aŭ tiom pli fari reformojn, estas nun ankoraŭ tro frue kaj danĝere. La aŭtoritecon de la aferoj de la lingvo mi transdonis al nia Lingva Komitato. Nia praktika laborado montris, ke Esperanto tre bone taŭgas por ĉio, kion ni bezonas, kaj ke la vojoj, kiujn ni iras, estas bonaj:"

Ĉu Esperanto havas ankaŭ moralan influon je la homoj?

"Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj homoj, ni ne kredas, ke Esperanto faros el homoj anĝelojn. Ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste estos malbonaj, sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de homaj krimoj."

Kiu povas rajte esti nomata "esperantisto"?

"Laŭ la Deklaracio, unuanime akceptita en la Bulonja Kongreso, ni scias, ke "Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas." "Sekve esperantisto ne estas sole tiu persono, kiu revas unuigi per Esperanto la homaron, esperantisto estas ankaŭ tiu persono, kiu uzas Esperanton ekskluzive por celoj praktikaj – esperantisto estas ankaŭ persono, kiu uzas Esperanton por gajni la monon – eseperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton por amuziĝi – kaj fine – esperantisto estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton por celoj malnoblaj kaj hommalamaj."

Tamen Esperanto ne estas nur lingvo

"Venos iam tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian idean karakteron – tiam ĝi fariĝos nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nuf tirados el ĝi profiton."

Kian signifon havas niaj kongresoj?

"Mi diris jam en Bulonjo, ke ni kunvenis por montri al la mondo per faktoj nerefuteblaj tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montris al la mondo, ke la reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla. - Krome - niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas signifon instruan kaj edukon. En ili kunvenas esperantistoj por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis ĝin, por kompari sian propran manieron da parolo kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kaj same izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la okazon praktike apliki tion, kion ili ellernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas bone interkompreniĝi. Sed kiam la balbutanto venas al la kongreso, kie li aŭdas bonajn oratorojn, li revenas hejmen kun nova entuziasmo, nova kuraĝo kaj energio."

Kial esperantistoj uzas kvinpintan stelon?

"Pri la deveno de nia verda stulo mi jam nun ne memoras bone. Pri unu broŝuro, kiun mi tute hazarde eldonis en verda kovrilo, atentigis min Irlanda esperantisto, ke tio estas koloro de lia hejmo – tiam venis en mian kapon, ke mi povas ja rigardi tiun koloron kiel simbolon de ESPERO. - Pri la kvinpinta stelo – ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko sinjoro Beaufront. Tio plaĉis al mi kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asociado dfe la ideoj aperis la stelo kun verda koloro."

Kiel ni danku al la Majstro?

"Se la esperantistoj opinias, ke ili devas esprimi al mi sian dankon, mi tiun ĉi dankon jam ricevis. Mi ricevos ĝin en alia maniero: kiam mi vidos grandan sukceson de tiu afero, al kiu mi dediĉis mian vivon, kiam ĉiuj batalantoj neniam ĉesos labori por nia afero. - Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur tero, sed ne eterne ĝi daŭros. La homoj venas, la homoj foriras, sed Esperanto daŭrigos – ĝis la idealo atingos sian venkon por la bono de la tuta homaro."

P.S.

La vortoj de Zamenhof estas ĉerpitaj el la libro:
ORIGINALA VERKARO de D-ro J. Dietterle.

Beaufront (elp. Bofron/, 1855-1935, franca profesoro, fama Esperanta lingvisto.

Lingva Komitato Esperantista /LK/ kaj ĝia Akademio.

Na kongresu v Bologne r. 1905 byla vybrána na návrh L.L.Z. "Lingva Komitato Esperantista" (LK), aby kontrolovala vývoj jazyka. Jejím cílem byla kontrola jazykových problémů a vývoj esperanta, ke kterému jazyk spěl. Jako zásadu pro chování LK k evoluci jazyka bylo vyhlášeno přesvědčení, že Esperanto může a musí se vyvíjet jako přirozený jazyk, tedy ne uměle pomocí dekretů LK, ale užíváním – slovem, písmem a esp. literaturou. Výbor zvolen v Bologne měl 102 členů z 28 národů. Aby se usnadnila práce tak početného výboru, byla zvolena 1908 jako jeho nadřízená komise "Akademio", která by se skládala z 18 členů. Úkol "Akademie" a LK byl vymezen následujícím prohlášením schváleným hlasováním LK: "Úkolem LK jest pečovat o zachování základních zásad jazyka a kontrolovat jeho vývoj. Má za úkol zkoumat všechny jazykové otázky a řeší je dle shora uvedených zásad. Nijak nemůže být Fundamento a Lingva Komitato hradbou pro normální vývoj jazyka.

V r. 1948 byl změněn název LK a "Akademie" na "Akademio de Esperanto" stanovy byly zrevidovány a cíl byl vymezen v prvním odstavci §-u 1 takto: "La Akademio de Esperanto" jest nezávislá Lingva Institucio, jejím úkolem jest uchování a ochrana základních principů jazyka esp. a kontrolovat jeho vývoj."

Akademie má předsednictví skládající se z předsedy jednoho nebo dvou místopředsedů, ředitelů odborů (oddělení) a hlavního sekretáře – pokladníka. Počet příslušníků Akademie jest kolem 40, ale nemůže být vyšší než 50.

Orgánem LK jest "Oficiala Gazeto Esperantista", vydávaný "Esperantista Centra Oficejo" v Paříži 1908 až 1920, od r. 1923 byla každoročně uveřejňována "Jarlibro de la LK kaj ĝia Akademio". Od r. 1929 až 1933 bylo vydáno 6 sešitů "Oficiala Bulteno", které byly nahrazeny r. 1934 per "Oficialaj Sciigoj de la Akademio".

Nejpřednější uveřejněné práce LK jsou: "Zamenhofaj vortoj" sebrané od Wackrill a Boulet, "Propraj nomoj" sebrané Beinem, Schröderem, Mochem, "Korekto de eraraj tradukoj en Universala vortaro" uveřejněné v brožurkách jazyků angl., franc., polského a ruského. "Vortaro de la Oficialaj Radikoj" v redakci Garta a Grosjean-Maupina 1922, "Oficiala Klasika libro de Esperanto" obsahující všechny oficiální kmeny s národnostně jazykovými překlady, v redakci E. Grosjean-Maupina. Tato vyšla 1924 s překlady francouzským, angl., něm., 1927 s překl. Ital. Španěl., portug.. Obsahuje kolem 2850 kmenů, přeložených a 1200 kmenů všeobecně srozumitelných Evropanům. "Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro" vyšly v r. 1909, 1914, 1921, 1929, 1934, 1935. Poslední počet kmenů v Universala Vortaro tím vzrostl z 2.723 na 4.186. Práce o esperantsko-jazykovém určení oficiálních kmenů a stálosti jejich gramatického charakteru byla začata 1936 v redakci Isbruckera, ale byla přerušena válkou. Nyní byla znovu zahájena.

Předsedové LK byli: 1906 – 1917 Emil Boirac (1851-1917), rektor university v Dijon, známý francouzský filosof, autor prvního "Plena Vortaro Esperanto – Esperanta".

1917 – 1931 Theophile Cart (1865-1931) francouzský profesor na škole politických věd v Paříži, pozoruhodný lingvista znající 7 jazyků, autor mnoha učebnic, z nichž nejznámější jest "E. En 10 leçons", přeložená do mnoha jazyků, redaktor "Lingvo Internacia".

1931 – 1933 John Mabon Warden (1855-1933) skot. Pojistný matematik u "Scottish Equitable", "Fellow" u fakulty "de Aktuaroj", matematik a sternograf, jeden z autorů "Edinburga poŝvortaro E" a šéfredaktor knihy "La sankta Biblio".

1933 – 1937 Maurice Rollet d' Isle: (1839-1943) hlavní ing. francouzského námořnictva, ředitel Ústředního hydrograf. Úřadu v Paříži, hlavní sekretář "Internacia Scienco Asocio Esperantista", redigoval jejich časopis a hlavně "Sciencan Fundamentan Esperantan Terminaron." 1937 ĝis nun J. R. G. Isbrucker (1889), holandský ing., autor knihy "Vývoj telefonie", člen redakce pro určení oficiálních kmenů pro slovník:

Je pozoruhodné, že LK se podařilo splnit svou těžkou práci za toto dlouhé období bez krisí. Dík si zaslouží jak předsedové s ostatními funkcionáři tak i celá esp. veřejnost. Tato zkušenost jest také důkazem životnosti našeho jazyka.

oooooooo

Antonio Grabowski (1857-1921) nejvýznamnější autor z prvního období esp. literatury. Je od něho první tištěný překlad do esp. "La neĝa blovado" od Puškina z r. 1889. Byl první, s nímž Zamenhof mluvil esperantem. Mluvil bezvadně též volapükem a navštívil faráře Schleiera, při čemž konstatoval že autor volapüku neovládá svou řeč plynně. Několik let byl jedním z horlivých reformistů, ale po rozhodujícím hlasování r. 1894 uznal, že hlavním problémem je spopularisování mezinár. Jazyka a jeho obecnější rozšíření. Jeho hlavní překlady: La Gefratoj (Goethe), Ŝi la tria (Sienkiewicz), Pekoj de Infaneco (Prus), Mazepa (drama Slowackého), Halka (text opery od Wolského), Antologio Internacia, Liro de Esperantistoj, Parnaso de popoloj, Sinjoro Tadeo (Mickiewicz). Vydal také velký slovník Granda Vortaro Pola-Esp. Kaj Esp.-Pola. Původních básní není od něho mnoho, ale Tagiĝo je proslulé a téměř druhá hymna esperantská. Byl ing. Chemie, vyvíjel také význačnou publikační činnost odbornou, je od něho Polský technický slovník, byl polyglot ovládající více méně 30 jazyků.

Antaŭparolo al la libro "La neĝa blovado".

En la "Aldono al la dua libro de l' lingvo internacia" la aŭtoro nin sciigas ke la "Amerika Filozofia Societo en Filadelfio" decidis kunvoki internacian kongreson de ĉiuj instruitaj societoj por decidi la finan formon de la lingvo internacia. La aŭtoro, transdonante sian laboron al la estonta kongreso, foriras de l' sceno kaj volas resti simpla amiko de l' afero, ne havanta jam la kompetentecon de ia kondukado aŭ leĝdonado. Mi ne bezonas ripeti tutan la enhavon de la broŝureto, kiun ĉiu amiko de l' lingvo internacia certe legis. Por mallonge diri: la foriranta aŭtoro montras al ni en la broŝureto la vojon, kiel ni mem sen kondukanto povas nun tute libere labori por l' afero, eldoni verkojn, krei vortojn kaj cetere, ĝis la estonta kongreso.

La verko de l' aŭtoro, kiel ankaŭ la vojo, kiun li elektis, montris sin bonaj; la aŭtoro bone pripensis la ilojn, kiuj kondukas al la celo. Al ni hodiaŭ restas nur ekprovi, ĉu ni jam efektive povas stari mem sur propraj piedoj. Ni komencu! Por elprovi miajn fortojn mi elektis malgrandan rakonton, sur kiu mi antaŭ kelkaj jaroj lernis la rusan lingvon, kaj mi donis al ĝi internacian veston. La rakonto, unu el la plej belaj de Puŝkin', donas en sia simpleco kaj natura fideleco multe konvenan pentron de la karaktero de l' lando kaj de ĝiaj anoj. - Kiel vere libere esprimi siajn pensojn per la malmultaj vortoj de l' vortareto (dank' al la kunmetebleco de la radikoj), ni vidis en la "Dua libro" kaj en la "Aldono"; mi vidis tion saman dum la tradukado de la nuna rakonto. Mi preskaŭ ne bezonis krei novajn vortojn kaj povis tute fidele traduki, kvankam oni trovas, ke la rakonto estas multe riĉa je malsamaj vortoj. La solaj du nomoj de arboj, kiujn mi ne povis formi el radikvortoj, mi prenis el la lingvo latina, ĉar en la botaniko ĝi ja estas internacia.

Mi deziras ke tiu ĉi libreto estu la komenco de l' eldonado de similaj verketoj. Se ankaŭ aliaj amikoj de la ling. Int. Alportos similajn ŝtonetojn por nia konstruo, ni baldaŭ havos ne sole lingvon internacian, sed ankaŭ la unuan veran "bibliotekon internacian", kaj la afero iros tiam rapide antaŭen.

La tradukinto.